**EUGEN WÜSTER**
FERNRUF: STEINPLATZ (4500)

Berlin-Charlottenburg 2, la 23.8.23.
Berliner Straße 23

st/K.

Al s-ro prof-o

G. P e a n o

C a v o r e t t o .

Tre estimata sinjoro!

Mi bone ricevis vian poŝtkarton de la 26a de julio. Mi since dankas vin pro la honoro, kiun vi volis fari al mi, enskribante min ki membron de via ApI.

Mi admiras la sagacan simplecon, kun kiu via harmonia Latino sine flexione deriviĝas el la antikva formo. Mi plene samopinias kun v ke nur la komuna science tolerema kaj objektiva kunelaborado de veraj i terlingvistoj povos rezultigi la definitivan formon de la internacia lingvo. Mi tre ĝoje salutus la ekziston de neŭtrala nacilingva perioda arĥivo por tia scienco. Tamen mi petas, ne inskribi min inter la membro de la ApI, ĉar malgraŭ ŝiaj statutoj ĝi ŝajnas al mi tro intime ligita kun unu speciala formo de interlingvo( L.s.fl.). Ankaŭ rilate al Esperanto kaj al aliaj sistemoj, pri kiuj mi laboris, mi rezervis tial mian sendependecon.

Akceptu la esprimon de mia alta respekto kaj sindona simpatio!

Wüster